Trastudante tiun el etan libron, kiu laŭdire entenas ĉirkaŭ 2500 vortojn, ni tamen venas al la konkludo, kiu akcentas nepre dezirindan, ja necesan internacian kunlaboron. Ni apenaŭ povas supozi, ke la respondecon pri ia taŭgeco kaj konveneco de la noveformitaj fakterminoj portas la Terminara komisiono de IFEF, kiu en dia internacia rondo estis pritraktonta tre funde kaj severe ĉiun unuopan terminon antaŭ ol oficiale prezenti ĝin al la tutmonda fervojistaro. Ni konsciu ja, ke nia Majstro scipovis mem perfekte minimume 5 gravajn naciajn lingvojn, el kiuj li do povis elekti la plej taŭgan vorton ĉu laŭ vidpunkto de internacieco, ĉu laŭ logiko, ĉu laŭ vidpunkto de la nova lingvo mem. Nu do, neniue (aŭ certe la plejmulto de novaj, kreantoj de pluaj vortoj ne) scipovas tiom da naciaj lingvoj. Do la eminentan kapablecon de nia Majstro devas anstataŭigi pli vesta rondo internacia de fakuloj kaj sufiĉe spertaj esperantistoj. La fakterminareto portas tamen la signon de la nacia karaktero de la kreinto, nome kelkloke iom tro detalan precizecon. Krome oni ne

povas senigi sin de la impresoj, ke ofte ankaŭ la elektitaj terminoj havas kaj montras spurojn de lia gepatra lingvo. Tiu ĉi fakto des pli argumentas la postulon — ke terminaron kreu internacia rondo.

Plue estus menciinde, ke kreantoj de novaj — precipe fakaj — terminoj evitu plej eble la superflujajn neologismojn kaj ke ili uzu eĉ ekzistantajn, ĝenerale jam akceptitajn terminojn (ekz. de la PV) en similaj, parencaj sencoj. Ni tuj diru ekzemplon: virko (= verko, konstruaĵo, objekto,) baskula (= klinebla, klapebla), kargo (= ŝarĝo). Ni imagu, ke nia internacia lingvo baldaŭ fariĝus lingvo ja tre riĉa, sed tute nekomprenebla al vastaj vicoj de ankaŭ simplaj fakuloj, por kies uzo nia lingvo, ja estas destinita. Du el la supre menciitaj vortoj estas jam sur paĝoj de vortaroj, tamen — kial rekomendi ilin, se estas eble anstataŭi ilin per bone kompreneblaj, jam kutimaj vortoj. Ekz. ĉu ne estus pli konvene anstataŭ „kargo” (laŭ PV) uzi: ŝipŝarĝo, tutŝipŝarĝo aŭ simple ŝipaĵo, same kiel vagonŝarĝo, tutvagonŝarĝo, vagonaĵo?

Kaj nun kelkajn specialajn atentigojn. „Apert-platformo” — ĉu laŭ PV ne estus pli taŭga „vagonperono”? „Artvirko” — eĉ se ĝi estas proponata de fakulo ŝosea, certe sufiĉas uzi „verko” (uzata en nova senco) aŭ „objekto”. „Baskul-bariero” — oni povus unuamomente supozi, ke temas pri iu ulo, portanta baskojn, do certe preferinde estus uzi „klapbariero”. „Regadejo” — certe sufiĉas „regejo” analoge al ludi-ludejo, dormi-dormejo, vendi-vendejo ktp. „Kablo-tramo, funikularo, telfero” = kablo-fervojo, pend-fervojo, ŝvebfervojo, unurela fervojo. „Frajtprezon” — ĉu „frajto” mem ne signifas la koncernan prezon de ekspedado? „Itinero” — kial ne „veturvojo” aŭ nur „vojo”? Nefakulo povus serĉi ie vorton „it-o”, poste „it-in-o” kaj fine „it-in-er-o”, do „ero da itino”, same kiel „aro de funikulŭ”. „Platforma aperta” = vagonperono (PV5. „Kontenero” — ĉu estas necesa nova vorto? Ni posedas ja tre belan kaj mallongan, krome nepre Esperantan; „ujo”! „Trajn-kruciĝo” — ĉu ne estas pli logike ekuzi „trajn-renkontiĝo”? „Veturdeĵorestro” — jen termino, kiu tipe montras, la influon de la gepatra lingvo, kiu sendube plej precize indikas tiun ĉi oficiston, sed — kial ekz. ne uzi „trajnekspedisto”?

Tre bonaj kaj trafaj vidiĝas la vortoj: klap-tableto, vak-vagono.

Fine de tiuj ĉi recenzaj vortoj estas necese diri kaj akcenti: s-ano Gernot Ritterspach faris meritplenan laboron. Ni esperu, ke li ne sentos sin ofendita, se ni konsilas al li venonte apogi sin je pli vasta kaj pli internacia rondo de kunlaborantoj, aktivigante la Terminaran Komisionon de IFEF al utila kaj fruktodona kunlaboro. Neniu nekompetentulo povas juste pritaksi lian plenumitan, penan kaj ofereman laboron, kiu meritas estimon kaj dankon de ĉiuj fervojistoj. Ni sekvu lian entuziasmon, ĉar tiu ĉi laboro estas eminente interesa kaj ankaŭ bezoniga por prepari nian lingvon al la oficiala ekuzo en interŝtataj fervojaj rilatoj! Ek al la necesega kaj meritplena laboro!

-eto

Slavko Stojkoviĉ, juna jugoslava teknikisto, Grad. pred. „Berilje” z. p, PROKUPLJE, S. R. Srbija, Jugoslavto, dez. kor pri div. temoj kaj iŝ. p. m. kaj bildkartojn.

Pardubice. En la lastaj du jaroj la movado iom stagnis, sed nun jam funkcias du rondetoj: ĉe Osvět. beseda kaj ĉe Kult. dům ROH. En junio 1966 okazis la regiona kunveno, kiun partoprenis 96 geesp. (65 el 21 urboj de la Orientbohemia regiono kaj 31 el 11 urboj de la ceteraj regionoj). La rondeto en Pardubice kunlaboras kun la Lerneja komisiono de la Loka Nacia Komitato kaj planas eldonon de bildlibro pri siaj urbo kaj regiono.

La reprezentanto de Urba Nacia Komitato k-do Fr. Sluka alte taksis La kunlaboron de E-rondeto, certigis ĝin pri plua apogo kaj s-anon Ant. Tobiášek el Dvůr Králové nad Labem distingis per valora librodono.

Pruvo de la fortiĝanta kluba agado estas la plenkunsido de ĈSEK, okazonta en decembro 1967 kun renkontiĝo de esperantistoj el Orientbohemia Regiono.

Kongresy a společný jazyk

The Worker Esperantist, 1. 2. 1967, - Prof. Minnaerts z Utrechtské státní university (Holandsko) napsal v knize „Astronomie a lidstvo“:

„Na mezinárodních kongresech je různost jazyků značnou překážkou. Všechny diskuse se musí překládat do angličtiny, francouzštiny a italštiny, a někdy i do ruštiny a němčiny. Pouze zavedení esperanta bude pro vědu znamenat uspokojivé řešení.“

Partoprenu la aŭgustan renkontiĝon de esperantistoj en Bratislava (kun plenkunsido de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato) kaj la septembran renkontiĝon de esperantistoj en la banloko Dudince (distrikto Zvolen) kun samtempa tutŝtata konferenco de Junulara Sekcio de ĈSEK.

EKSPOZICIO KOSMO KAJ INFANOJ — KONKURSO.

Popola Astronomia Observatorio de la urbo Žilina jam dum kelkaj jaroj kolektas infandesegnaĵojn je la temo „La kosmo kaj infanoj“. Ĝi preparas internacian ekspozicion, kies celo estas montri la imagojn de infanoj pri la suno, luno, planedoj, malproksima kosmo, artefaritaj satelitoj, kosmaj sondiloj kaj penetrado de la homo en la kosmon.

Popola Astronomia Observatorio de la urbo Žilina alvokas al kunlaboro ĉiujn instruistojn de belarta edukado kaj ĉiujn amatorajn belartajn rondetojn, grupojn kaj unuopulojn dum sia liberta tempo arte pentri kaj prilabori ĉion kio rilatas la ekkonon de la kosmo. Por la preparata internacia ekspozicio oni povas sendadi diversprofesiajn belartaĵojn, kiel ekzemple grafikaĵojn, pentraĵojn, desegnaĵojn, plastikaĵojn, ceramikaĵojn kaj aliajn teknikaĵojn, reproduktantaj kaj esprimantaj partojn el la historio de astronomio komence de la plej primitivaj homaj imagoj rilate la konstruon kaj ekeston de la kosmo, same belartaĵojn, reproduktantaj la grandskalajn sukcesojn de la astronautiko, de la unuaj artefaritaj satelitoj de la tero ĝis la fame konataj flugoj de kosmonaŭtoj.

Popola Astronomia Observatorio de la urbo Žilina turnas sin al profesoroj, instruistoj kaj akademiaj pentristoj, al ĉiuj estroj de diversaj belartaj grupoj kun peto, ke ili instigu la junularon al desegnado kaj pentrado de la beleco de naturfenomenoj, de la beleco de la evoluo de nuboj, ĉielarko, fulmoj, brilantaj nuboj, polusa lumo,

fantazia mondo de planedoj de la sunsistemo, fantaziaj landoj eksterteraj kaj de ĉio, kio okazas en la naturo kaj kosmo.

Ni turnas nin kun peto al ĉiuj naturamikoj, ke ili sendadu al ni kontribuaĵojn el la infana medio de la tuta mondo. La internacia ekspozicio „Kosmo kaj infanoj” migrados kaj oni inaŭguros ĝin la 4-an de oktobro 1967-a en Žilina okaze de 10-a datreveno de la elpuŝo de la unua satelito.

Ni petas sendadi la kontribuaĵojn por la ekspozicio ĝis la 30-a de julio 1967.

Ĉiu laboraĵo, kiun la valortaksanta komisiono elektos, ricevos diplomon, eventuale honoran rekonon.

Ĉiun laboraĵon bonvolu signi per kompletaj nomo, aĝo kaj preciza adreso de la aŭtoro. Bonvolu skribi legeble prefere skribmaŝine, por ke ne ekestu neprecizaĵoj.

La infanbelartaĵojn, de la plej frua infanaĝo (eĉ de infanoj ankoraŭ lernejon nevizitantaj) ĝis la 15-jaro, sendadu afable je adreso: Ľudová hvězdáreň mesta Žiliny, (Popola Astronomia Observatorio, Žilina - Ĉeĥoslovakio).

Karolo Píĉ

LINGVA ANGULO

FRENEZAJ POETOJ AŬ PRI LA NEOLOGISMOJ

Oni forbruligu min sur ŝtiparo kiel herezulon! Sed pluraj el la ekzistantaj neologismoj sentiĝas fremde kaj malvarme! Evidente, la lingvo ne „digestis” ilin! Tio ne estas afero leksikologia aŭ lingvistika! Tio estas afero psikologia, demando de la subkonscio!

Multaj el niaj neologismoj ne estas elektitaj nebone! Tamen — mankas ia nedifinita „io”, pro kiu oni ne akceptas ilin.

Sam Ideano ŝatas poezion. Sed same fakte li malŝatas neologismojn! Mi ne estas tute certa pri tio, sed mi timas, ke la neologismojn defendas nur la literaturistoj, kiuj ilin kreas.

Preskaŭ instinkte la moderna leganto evitas ĉion nenaturan. Tamen, vole-nevole la neologismoj estas iom „nenaturaj”. Ili estas ornamo. Sed estas falsa ornamo, io kvazaŭ rozoj el papero! Kontraŭe, ni devas allasi, ke ĝuste la dudeka jarcento estas tiu de artefaritaj floroj! Ĉar nur la dudeka jarcento investis la kulton de ĉiaspecaj Surogatoj. Certe silka vesto estas bela vesto. Sed nilona vesto estas pli moderna. Krome ĉiuj virinoj vivas nur en nilono! Ekzistas ja onidiroj, ke silko estas pli higiena kaj agrabla. Sed diablo prenu la higienon! Ĉar la modo staras antaŭ higieno!

Certe ankaŭ per la malnovaj vortoj oni povas interkompreniĝi! Sed — ĉu la lingvo servas nur por interkompreniĝo? Eble la neologismoj ne estas tiom klaraj! Sed ili ja estas — neologismoj! Kaj tio, nunmomente, gravas!

Estas facile verki poemon, klel ekzemple:

KOKLIKOTO

*Sur kampa baŭndo koklikoto
fajris samkiel sub narkoto
simile al tetacion'.
Super ĝi la solejl' ruberis
kaj preter ĝi tre kalme pleris
la primavera turbilon.*

*Darlingon vian vi kondukis,
en koklikotan bunĉon plukis,
kaj frohis. Ed al kampa bed
tre solituda li vin menis.;
kaj tie vi ed li ruhenis.
Kaj poste vi sen anksiet*

*vin spredis sur la kampa spoto
apude kun la koklikoto,
ed svene sinkis sub oskul' . . .
Kal post tre longa libkontakto,
ed post pasia lova akto
vi vekis vin el la kopul':*

*Neare la lovbunĉ' fletrinta;
enherce souvenir absinta;
la virginito for en kot'...
Nur ĉirkaŭ vi la sempre selba
korncereala kampo gelba:
ĉie la reda koklikot' . . .*

Ĉu vi ne komprenas? Se tio vin konsolos, ankaŭ mi ne komprenas! Sed — nur flustre kaj singarde! Aŭdinte vin, oni povus stampi vin kreteno! Ĉar, sciu', vi ne komprenas, kio estas la vera Arto! Vi tute ne rimarkas la elegantajn ritmojn kaj la riĉajn rimojn, pro kiuj, fakte, oni kreas poezion! Vi estas ĉeplanka spirito, al kiu oni devas ĉion antaŭmaĉi! Kaj mi timas, ke estas vi, pri kiu Kalocsay devis skribi:

*„Aŭskudtu!... ho, sed kiu ja aŭskultas?
Se eble kelkaj nur ankoraŭ kultas
La poezion skribe, kiu lege?
Jes, la poemoj elmodiĝis ege:
Vendiĝas la romanoj, kvazaŭ pano,
Sur versojn — kraĉas la samideano.
Enhavon oni volas kaj ne formon,
La Belo taŭgas nur por trudi dormon,
La dolĉajn Muzojn kiu volus festi?
Ja manĝi oni volas kaj digesti.
Al la poeto oni fermas pordojn,
rekordojn oni volas kaj ne kordojn..."*

Ni lasu tion! Mi, vi kaj Sam Ideano ŝatas la poezion! Ni tute ne kraĉas sur la versojn! Sed, ĉe Alaho, ni volas legi la normalan Esperanton! Ni volas, ke oni regalu nin, per la klara, Zamenhofa lingvaĵo, al kiu ni enamiĝis kaj kiun, siatempe, ni ellernis! Ni tute ne emas solvi lingvajn enigmojn kaj rebusojn! Ni ne inklina, traserĉadi cent vortarojn, por ekkompreni unu solan poemeton. Ĉar la poezio, estu poezio, ion, kion oni povus legi kaj ĝui, kaj ne egipta papiruso, super kiu oni devas malesperi!

Iuj poetoj plendas, ke la publiko ne volas iliajn versojn! Ili ne miru! Koklikotoj vekos nenies simpatian, aŭ maksimume, nur la simpatian de ilia aŭtoro kaj verkinto. Sed „traduku" ilin en Esperanton:

SOVAĜPAPAVOJ

*Sur kampolim' sovaĝpapavo
purpuris inter grena flavo
simile al ruĝega tent'.
La suno super ĝi fosforis;
senbrue preter ĝi zumploris
somere ŝercpetola vent'.*

*Vi kun amato via iris:
papavbukedon jen li ŝiris;
vi ĝojis; kaj al kampolim'
izola li vin mute gvidis;
kaj tie vi kaj li eksidis;
kaj poste vi sen ĉia tim'*

*vin sternis sur kkamplima bedo
apude kun la ambukedo,
kaj dronis sub multega kis'...
Kaj post longega muta kuŝo
kaj post premega varma tuŝo
vi vekis vin el la surpriz'.*

*Apude la bukedo velka;
enkore rememoro kelka;
la invirgeco ie for,..
Nur ĉirkaŭ vi la ĉiam sama
pejzaĝ' kaj bildo panorama:
Milope la papava flor'...*

Nu, tio estas iom alia poezio. Nun eĉ Sam Ideano interesiĝos! Kaj li, eble, eĉ laŭdos la versaĵon! Ĉar Sam Ideano estas normala homo. Kaj kiel normala homo li havas sanan kaj normalan instinkton! Li scias, ke ĉiuj bonaj aferoj estas simplaj aferoj! La materio estas simpla! Kaj la Kosmo estas simpla! Tial ankaŭ la Poezio devas esti simpla! Kaj, efektive, la vera Poezio fakte estas simpla!

Eble Sam Ideano estas iom nemoderna! Tial, feliĉe, li antaŭiras sian epokon. Kaj tial oni kalumnias lin! Ĉar li defendas la malnovan kaj mezepokan kredon, ke ĉiu malsimpla aĵo, neeviteble, estas malbona kaj diabla aĵo, La vero ĉiam paŝas rekte! Nur la mensogo devas kurbiĝi kaj zigzagi!

Cetere, ĉi tiun ĉapitron oni povus titoli LA GRANDA MISKOMPRENO! Ĉar, fakte, temas pri miskompreno!

Homoj, kiuj asertas, ke la literaturo bezonas specialan vortprovizon, estas neinformitoj kaj idealistoj! Iam, vere, la literaturo kaj la konversacio uzis du malsamajn lingvaĵojn. Tamen la estimindaj sinjoroj, kiuj argumentas tiel, ne vekigis! Ili intermiksas la gramatikajn tempojn. Tio estis, sed ne estas! Ili preterdormis tri aŭ kvar jarmilojn! Ĉar precize antaŭ tri aŭ kvar jarmiloj io tia estis ankoraŭ moda (kvankam, tamen, tute ne tro moda!) En la malproksimaj jarmiloj de la Grandaj Diferencoj la poezio kaj la prozo povis - malsimili! La poezio devis esti ora kaj kolora! Sed la dudeka jarcento ne estas jarcento de Hatŝepsovet aŭ Nofretete! Antaŭ tri aŭ kvar jarmiloj la poezio estis Incensa Fumo de la Faraonoj! Post tri aŭ kvar jarmiloj ĝi estas tute civila kiel mia biciklo aŭ kiel ŝtrumptenila zono de fraŭlino el kontoro! Mi ne scias, ĉu jam ankaŭ la servistinoj de Nofretete portis ŝtrumptenilojn, kaj ĉu ia nekonata poeto prikantis ilin (la ŝtrumptenilojn!) Sed eĉ se li faris tion, ĉiukaze, liaj poemoj bedaŭrinde ne konserviĝis!

Antaŭ kvar mil jaroj nur la Suno, Luno, Zodiako kaj Ŝia Faraonina Moŝto rajtis eniri en la poezion. Post kvar mil jaroj, krom la Suno, Luno, Zodiako kaj Ŝia Faraonina Moŝto, en la poezion rajtas veni tute ĉio!

La neologismoj ne estas afero gramatika! Ili estas afero estetika! Mi ne rifuzas

la vortojn **botono**, **desaponti**, **primavero**, kaj **rankoro** pro tio, ke ili estas nekompreneblaj! Mi malakceptas ilin pro tio, ke ili estas eksmodaj, bombastaj kaj ridindaj! En la naciaj literaturoj oni ilin ne aplikas. En Esperanto ili ne ĉesas furori!

Nun nenia iom elstara poeto kuraĝus uzi la tielnomatajn poeziajn vortojn, ĝuste pro tio, ke ili estas „poeziaj”. Esperantaj poetoj, kontraŭe, baldaŭ ne kuraĝos uzi la Zamenhofan, eble pro tio, ke ĝi estas Zamenhofa kaj ke ĝi estas Esperanto! Ili forgesas, ke poezion ne faras la damnitaj „poeziaj” vortoj! La plej eminentaj nuntempaj naciaj poetoj parolas la ordinaran, ĉiutagan lingvaĵon. Ilia vortaro estas tute griza, preskaŭ eĉ vulgara. En iliaj poemoj ne aperas vortoj, kiujn ne konus la domservistinoj kaj tajloroj. Ĉar ekzistas nur unu sola Belo, tiu, kiu estas ĉirkaŭ ni! -

Eble ŝtrumptenila zono kun perloj kaj safiroj kaj kun bukoj el oro kaj eburo estus poezia! Sed la problemo konsistas el tio, ke nenia virino portas tian zonon! Verŝajne tiaj zonoj aperas en ies fantazio. Bedaŭrinde tiu fantazio estas nematura kaj malsana!

Oni povas revii pri birdo, en kies ventro vojaĝus dudek pasaĝeroj. Sed mi, vi kaj ĉiuj ni scias, ke tia birdo ne ekzistas. Tamen, ĉeokaze, ni povus flugi per Iljuŝin.

Person mi kredas, ke iu ajn ordinara printempo estas pli poezia ol mil elsonĝitaj primaveroj! Stratangula afiŝo estas pli ekscita ol la fluganta tapiŝo! La unua kiso estas aventuro. Kaj ne estas necese kisi rekte la reĝinon de Sabo! Ĉar ĉiu unua kiso estas dolĉa, egale, ĉu ĝin donis studentino aŭ princino!

La neologismoj estas kulisoj. Ili bezonas reflektorajn. Kaj ili ne toleras la taglumon! Tamen sub la reflektora brilo oni povas ludi teatraĵojn, sed oni ne vivas tie! Krome la neologismoj estas modo! Bedaŭrinde, ili estas iom malnova kaj eksmoda modo! Ĉar pasis plenaj tri jarmiloj ekde la momento, kiam ili ankoraŭ estis modernaj. Ili estas strangaĵo. Eĉ pli. Tiuj aŭtoroj kiuj volas plaĉi al la publiko, jam forlasas ilin. Kaj restas nur kelkaj, pri kiuj neniu scias, por kiu ili verkas. Normala homo suspektus, ke ili verkos por la Leganto. Sed tie ĉi, evidente, la normalaj konkludoj ne validas. Ĉar — iuj poetoj ne estas normaluloj!

Mi allasas, ke ili bezonas neologismojn por traduki. Sed neniu bezonas iliajn tradukaĵojn! Mi ne scias, ĉu vi sopiras legi la verdan Iliadon. Sed mi estas la lasta, kiu sopirus tion! Ĝis nun mi ne renkontis bonan, ĉeĥan tradukaĵon de la Iliado. Kaj mi dubas, ĉu iam ekzistos bona tradukaĵo Esperanta! Tamen eĉ se ĝi ekzistos, mi ne legos ĝin! Ĉar ĝi estos nur superflua laboraĵo kaj vane plenpresita paperaĉo! Ni lasu dormi la malnovan Homeron. Kaj ni rapidu! Ĉar la tempo pasas. Kaj la vivo estas tro mallonga.

Cetere, mi miras, kial la homoj, kiuj volas „gelba” aŭ „suveniĝo”, estas esperantistoj. Se tiaj vortoj plaĉas al ili, ili turnu sin al la franca aŭ germana! Ĉar, unue, ĉe Esperanto ili ne trovos tion, kion ili serĉas. Due, Esperanto ne bezonas ilin!

La Poezio estas Belo. Kaj la moderna homo avidas la Belon. Sed la belo komenciĝas ĉe la gramatiko.

Kalocsay estus pli legata, se li uzus nur la oficialan vortprovizon. Mi ne scias, ĉu li scias tion. Sed la Plena Vortaro de Esperanto estas pli populara ol oni, ĝenerale, kredas! Ĝi estas kvazaŭ ia evangelio. Oni ne dekliniĝas de ĝi senpune! Feliĉe, tiu ĉi riproĉo validas nur pri la juna Kalocsay. Ĝi ne koncernas la maturan Kalocsay. Sed eĉ tie ĝi estas iom nekonvena kaj maljusta, kion pravas, interalie, ĝuste la supre citita

Kalocsaya fragmento, kiu estas klasika simpla, kristale klara, kaj evidente ĉarma. Krome, multaj Kaloĉajaj neologismoj dume tute ĉesis esti neologismoj. Ili iĝis parto de la normala vortprovizo. La evoluo sankciis kaj confirmis ilin.

Nu, eble la leganto diros, ke ĉio ĉi estas nur multa krio pri nenio. Nu, unue, iam estas necese, ke oni iom krii kaj trumpetu! Kaj, due, ne ekzistas krio sen averio. Kio montras, ke tamen ni ne prelegis tute vane kaj senkaŭze.

Unu el la plej ŝatataj Esperantaj poetoj estas la ĉiam ridetanta Raymond Schwartz. Sed — oni ne ŝatas lin nur pro tio, ke li estas sprita. Oni ŝatas lin pro tio, ke li estas klara! Jen la sekreto de lia sukceso!

*„Tial, poeto juna, se vi volas laŭrojn,
ne faru kapriolojn, nek frenezajn kaŭrojn!
La frazojn plektu lerte kaj, laŭeble, klare!
La vortojn kaj vortarojn uzu senerare!
Neniam la leganton per rebusoj ĝenu,
kaj antaŭ ĉio, kara, oni vin komprenu!
Ĉar estas ja nur sola Art' kaj Nimbo:
la gramatika Klar' kaj - la genia Simplo!"*

(Rim. de la red.: la cititaj fragmentoj Kalocsayaj devenas el „Parnasa Gvidlibro")

Theodor Kilian: „Seznam 808 nejužívanějších slovních kmenů v mezinárodním jazyce esperanto", 32 strany; 12 X 16,5 cm, vydal Osvětový dům Bedřicha Václavka v Třebíči jako metodický materiál pro posluchače jazykových kursů, 1967. Cena neuvedena.

Učební pomůcka má žákovi umožnit, aby si bezpečně osvojil základní slovní fond esperanta. Seznam obsahuje navíc 1563 odvozená slova, která názorně seznamují s tvorbou slov v esperantu pomocí předpon a přípon a dále tabulku souvztažných slov, přehled předpon a přípon a stručný přehled mluvnic. Vtipná rýmovačka má napomoci k snadnějšímu zapamatování koncovek.

Ve vhodném výběru slov, odvozenin a slovních vazeb jsou uplatněny zkušenosti vedoucích kursů pro české začátečníky, kteří se pod vlivem mateřštiny dopouštějí týchž chyb nebo volí slovní vazby, jež neodpovídají duchu mezinárodního jazyka. Přes omezený rozsah obsahuje Seznam i několik novodobých výrazů. Za objev považují *langeraro* (přeřeknutí, brept).

Do dílka se vloudilo několik jazykových chyb nebo nepřesností: **centripeta** odstředivý (správně dostředivý: **centrifuga** odstředivý vynecháno); **nigriĝi** černat se (správně černat, zčernat); **pezi** označeno jako transitivní s druhým významem mít míru; **prezidantaro** předsednictví (-ctvo!); touha po vlasti (str. 32) není **enuo je la patrujo** (správně: **sopiro**); **ŝanĝo** není jen výměna, ale především změna; **rajti baloti** právo volit (rajto!); **kortbirdo** drůbež (-aro!); **afranki bilde** (bildflanke!); **arta** není jen umělý, ale i umělecký (verko); **konduktoro** průvodce užíváme již jen ve smyslu průvodčí; **onidiro** nemá výlučný význam tlach, „kachna": vždyť jsou i pravdivá

onidiroj (s významem komuna diro, famo). Tiskových chyb je asi 19, např.: plyně (tsr. 10), opravit (informi: zpravit!), multeskosta, reprezentantto, nekončný (22), vichor (vichr — 25), fyziko (32); další se týkají především interpunkce.

Vydání Seznamu s moderní grafickou úpravou obálky je záslužným počinem a vítaným příspěvkem k zaplnění mezery v době, kdy esperantské slovníky opět nejsou na trhu. Zájemcům lze jej jen doporučit.

J. Mařík

III INTERNACIA ESPERANTISTA

FERIO

20. IX.-3. X. 1967 — Migdzygórze,
Pollando

Post granda sukceso de la unua kaj dua IEF, ankaŭ ĉi-jare okazos de 20. IX. ĝis 3. X. 1967 la Internacia Esperantista Ferio en pitoreska montara ripozloko Migdzygórze. Ferion organizas Feria Fako de Polaj Sindikatoj, Fako pri Kulturo de Distrikta Nacikonsilantaro en Bystrzyca Klodzka kaj Okcidenta Regiono de Pola Esperanto-Asocio. Honora protektanto de la Ferio estas S-ro Józef Baran — prezidanto de la Distrikta Nacikonsilantaro.

La programo antaŭvidas interalie: interkonan vesperon, balon, konsultajn horojn pri lingvaj problemoj, ekskursojn, dancamuzojn, balon de ĉifonuloj, ŝakkonkurojn inter la diversnaciaj grupoj, sportan spartakiadon, vesperon ĉe fajrejo, vesperojn de l'Amikeco, dum kiuj grupo de partoprenantoj el sama lando prezentas al ceteraj partoprenantoj programon pri sia lando, prezentadon de esperantlingvaj sonfilmoj, lernadon de esperantlingvaj kanzonoj kaj multaj aliaj. Dum la Ferio poŝtofiĉejo uzos specialan poŝtstampilon. -

La Ferion oni povas partopreni por du semajnoj (20. IX.-3. X. 1967) aŭ nur por unu semajno (20. IX.-26. IX; 67; 27. IX-3. X. 67). Partoprenkotizo por du semajnoj estas = 440 ĉeĥoslovakaj kronoj (por unu semajno duono de tiu ĉi sumo). La partoprenkotizo ampleksas la tutagan manĝadon, tranoktadon kaj aliajn programerojn.

Lastatempe Pollando simpligis siajn turismajn regulojn. La transitvizioj validas tri tagojn kaj la normalaj vizoj validas ses monatojn. Esperantistoj el socialismaj landoj ne bezonas enirvizon!

Detala informilo, aliĝiloj kaj invitiloj estas riceveblaj de: Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta Regiono, WROCLAW — 17, poŝtkesto 8, str. Dubois 3, Pollando.

Kunveno de sudbohemiaj esperantistoj.

Reprezentantoj de esperantistaj kluboj el České Budějovice, Tábor kaj Písek kaj individuaj esperantistoj el Strakonice kaj Blatná partoprenis dimanĉe la 9-an de aprilo 1967 en Kulturdomo de Uzina klubo Jitex en Písek sian unuan laborkunvenon.

La kunvenon gvidis inĝ. L. Krajíc el Tábor kaj partoprenis ĝin pli ol tridek delegitoj. La prezidantoj de menciitaj kluboj raportis pri ĝisnuna agado kaj planoj de siaj kluboj. Kiel anstataŭanto de Jana Cíhová, komitatanino de ĈSEK, kiu prizorgas

la kontakton kun Sudbohemia regiono, salutis la partoprenintojn O. Hrubý el Ĉ. Budějovice kaj konatigis ilin kun labora kaj eldona planoj de ĈSEK kaj kun ĉefaj taskoj de Ĉeĥoslovaka esperantista movado en la jaro 1967.

La reprezentantoj de la kluboj interkonsentos pri reciprokaj kontaktoj, interŝanĝo de informoj kaj programoj kaj pri komuna solvado de problemoj. La partoprenintoj opinias, ke la ĉefa obstaklo, staranta sur la vojo al plua disvastiĝo de internacia lingvo en nia lando, estas manko de unueca tutŝtata esperantista organizo. La sudbohemiaj Esperanto-kluboj turnas sin al Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kun alvoko, ke ĝi plifortigu sian ĝisnunan klopodon, celantan al kreo de tutŝtata organizo.

Fine de la kunveno oni decidis kunvoki la venontan renkontiĝon aŭtune al České Budějovice.

Post komuna tagmanĝo la partoprenintoj trarigardis la urbon kaj ĝian muzeon. Klarigojn en Esperanto donis L. Křivánek.

O. Hrubý

Fervoja terminareto.

Bulteno de la Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista 11, 1966 XII, ĉ. 4, Esperantské názvosloví od Gernota Ritterspacha vydala Germana Esperanta Fervojista Asocio. Cena 6,50DM u autora (Berliner Allee 1, D-607 Langen), v Rakousku u AFEF, 1103

Sporta vortaro.

IOE-Gazeto 1, 1966 IX, ĉ. 3, s. 6

Sportovním názvoslovím se zabývá řada esperantistů. Aby byl výsledek co nejlepší, vyzývá redakce ty, kdo ještě chtějí spolupracovat, aby se přihlásili (adr.: Pop Lukina 1, Beograd).

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU — INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO - KOMITATO. — Vydává — Eldonas. Osvětový ústav v Praze, Blanická 4, Praha 2. Rediguje — Redaktas: Dr. L. Izák s redakčním výborem — kun la redakta komitato: J. Cíhová, ing. Ed. Felix, Zd. Hršel, O. Kníchal, M. Lukáš, Dr. T. Pumpr, Ing. Fr. Sviták, Ed. V. Tvarožek, J. Vondroušek. Tisk — Preso: Tlačiarne Slov. nár. povstania, Martin. V-15.71295.